

La Movado

Fondita en 1951 N-ro 681 nov. 2007

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802

KJUŜUA ESPERANTO-LIGO
Kutii 1597-1, Yamato-tyô, Saga-ken, 840-0202

ESPERANTO-LIGO de TYÛGOKU kaj SIKOKU
Oogonzan-tyô 7-15, Minami-ku, Hirosima-si, 734-0041

ENHAVO

第5回アジアエスペラント大会へ……A. Giridhar Rao	1
Kajero libervola: 世界大会の保育所……Aikawa Setuko	2
ちょっと考える作文教室(45)……田熊健二	3
対訳: 今昔物語(41)……島谷 剛	4
世界大会とアジアの運動……峰 芳隆	5
Kiel aprezi hajkon……Hirota Masaaki	6
モバード俳壇(14)……広高正昭	7
歌の訳し方(7)……小西 岳	8
Jen nia rondo: 和歌山緑丘会……福本博次	9
Vortaro por lernantoj(62)……Laŭlum	9
Solvoj al la septembraj enigmoj……	10
出版: 世界の歌/父帰る/オールド詩集/長谷川テ	11
La Movado: 来年の大会/学習会/ザメンホフ祭予定	12
世界大会前後の西日本各地の交流……編集部	13
ふ報: 田辺辰次さん, 箕邦磨さん……	14
Enigmo……辰己 博 14 / Mikspoto……	15



5 - a Azia Kongreso
de Esperanto

“Esperanto en multlingva Azio”

Venu al la 5-a Azia Kongreso de Esperanto
en Barato

[p5参照]



Karaj Legantoj de La Movado!

Venu al la 5-a Azia Kongreso de Esperanto en februaro 2008. Venu al Bengaluro, la ĝardenurbo de Barato, la 6a plej granda urbo en la lando. Se vi ŝatas mildan klimaton, belajn pejzaĝojn, bonhumoran, simpatian loĝantaron, riĉan kulturon, belsonajn lingvojn, lokajn bongustajn manĝaĵojn, vere indan bieron kaj profundan dormon, ne maltrafu la ŝancon!

De la 11a ĝis la 15a de februaro, ni kunestos en Bengaluro por diskuti la kongrestemon: “Esperanto en multlingva Azio”.

En la komforto de la kongresejo de la esplorinstituto NIMHANS, la kongresaj sesioj esploras la rolon de Esperanto ĝis nun kaj estonte en la plurlingva, azia etoso. La Kongreso ankaŭ emfazas la daŭrantan rolon de Esperanto en pli fortigado de rilatoj inter aziaj landoj.

Kompreneble pliriĉigos la aranĝon diversaj

fakkusidoj: prelegoj kaj buntaj elmontraĵoj pri la filozofioj, religioj, historioj, lingvoj, literaturoj, muzikoj, dancoj, kuirartoj: unuvorte, kulturaj.oj.

Ni esperas ĝui kontribuajn.ojn ne nur de vi ĉiuj, karaj legantoj, sed ankaŭ de la neaziaj partoprenantoj en nia Kongreso.

Kaj por malstreĉiĝi troviĝos en la vesperoj distraĵoj diversaj, kulturaj.oj prezentotaj ne nur de la talentaj inter vi, sed prezentaĵoj ankaŭ pri la lokaj ĝuindaĵoj.

Ni esperas, ke la kongresaj tagoj pliakrigos vian apetiton gustumi aliajn indaĵojn de Barato! Tial ni havas du riĉajn itinerojn postkongresajn: sudbaratan kaj nordbaratan. Legu la detalojn en nia retpaĝaro: <http://geocities.com/bharato/eventoj/ak2008/ak2008.htm>

Esperante vidi vin ĉiujn en Bengaluro,
Amike salutas,

A. Giridhar RAO (Hyderabad, Barato)